

# Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2018

Jarkolekto 5 - Numero 3



# ENHAVOTABELO

de julio 2018

Titolpaĝo ... <i>bildoj de belga UK-medalo, eldoncele preparitaj de Hans Jankowski, sed neniam antaŭe publikigitaj</i> .....	1
Enhavotabelo .....	2
De ni por ... ni .....	3
Moneroj & medaloj .....	4
<i>Jubilea medalo 1887 - 1912</i>	
<i>Ĝemeliĝa memormedalo Massa 1960</i>	
<i>Ĝemeliĝa memormedalo Massa 1960 - 1980</i>	
<i>Centjariĝo de la Esperanto-movado en Sosnowiec (2002)</i>	
<i>Pola medalono UK 1987 Varsovio</i>	
Spikumajoj & suplementoj .....	13
Por spuremuloj! .....	14
Aspektoj de numismatiko: Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (4)...	15
Medalistoj: 13 Friedrich Moritz Brodauf (1872 – 1939) .....	18
Historiaj aspektoj: Internacia Helpa Mono (3) .....	19
Terminaro: Alfabeta listo (14) .....	20
El la gazetaro .....	21
Retpoŝto .....	22
Anoncoj & eventoj .....	29

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts  
Provlegado: Jozefo Horvath  
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!  
Finredaktoro: Bert Boon

bert.boon@skynet.be  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## DE NI POR ... NI!

### Karmemore kaj honore al Johannes Jankowski (1929 – 2018)



La dekan de majo forpasis en Dortmundo (Germanio) nia Hans Jankowski, pioniro kaj “baptopatro” de la esperanta numismatiko, kies nemalhaveblaj broŝuroj, rezultoj de senĉesa kaj sindona serĉado kaj esplorado, estas la fundamentoj de la revuo (kaj evidente de Katalogo kaj de Terminaro ankoraŭ kompilendaj) de nia Esperanto-Numismatika Asocio.

Nur malmultaj informoj troveblas pri lia (kluba) vivo kiel esperantisto. Kvankam sendube sociemulo, li tamen aspektis sufiĉe silentema, eĉ iom grumbleca. Tion la germanlingvanoj nomas “Einzelgänger” (soleculo). Li estis fraŭlo, kiu multe vojaĝis, ĉefe al baltaj ŝtatoj, sed oni povis ankaŭ hazarde renkonti lin okaze de Universalaj Kongresoj (ekz. en Berlino), malfermaj tagoj (ekz. en Roterdamo) kaj regule kiel partoprenanton dum ĉiujaraj eventoj kiel Internacia Festivalo, organizita de la fama Hans-Dieter Platz (HDP) en germanaj urboj. Malgraŭ sia malsana stato dum la lastaj jaroj de sia vivo leregule vizitis Nepalon por malavare subteni siajn lokajn esperantistajn amikojn, kiuj tial povis viziti esperantajn kongresojn.

La unuan jarkolekton de nia revuo – sur kies titolpaĝoj ĉiam brilos kvar el liaj broŝuroj – ni respekte kaj admire dediĉis al Hans pro liaj nemistakeblaj meritoj. Kiel membro de ENA li ofte diversmaniere kunlaboris, sed, eĉ afable petata, li tute ne juĝis, nek laŭde, nek kritike. Jen nia Hans, kiel li aspektis kaj agis.

Ni supozas, ke neniu el niaj membroj kontraŭstaros ĉi tiun proponon: ekde nun ni konsideros kaj honoros Hans kiel la unuan honoran membron de ENA.

Ni tre sincere kondolencas la geparencojn de Hans pere de lia nevo sinjoro Ralf Kibbel, kiu jam akceptis foti por nia revuo kelkajn heredajn numismatikaĵojn el la kolekto de sia onklo.

Hodiaŭ ni tamen volas fini per pozitivaj novaĵoj: nia 92a individua membro estas la unua aliĝanto el Hindia Unio Barato. Kiel 20an asocian membron ni krome bonvenigas la faman belgan bibliotekon de Antverpeno “Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience”, kun kiu ni jam intense kunlaboris pere de sinjoroj Cyril Knockaert kaj Marcel Van den Heuvel.

Bert

*Pro la havigo de la foto de Hans ni tutkore dankas niajn Elda Dörfler kaj Rudolf Burmeister de ELF-AREK.*

Als die Kraft zu Ende ging,  
war's kein Sterben,  
war's Erlösung.

**Johannes  
Jankowski**

\* 25. 4. 1929 + 10. 5. 2018

Wir verabschieden uns und bewahren ihn  
in unseren Herzen.

In stiller Trauer:  
**Ewald Kibbel**  
**Ralf, Claudia, Kristina und Theresa**  
**Andrea und Nele**  
**Karsten und Stephanie**  
**Familie U. Kibbel**  
**Familie M. Rumler**

Dortmund

Die Beisetzung findet im engsten Familienkreis statt.

Kondolenzanschrift:  
Bestattungen Teves KG, Provinzialstraße 387,  
44388 Dortmund, Telefon: 0231-693777

# MONEROJ & MEDALOJ

## Tipo E 1 – Pra-insigna medalo

Jubilea medalo 1887 – 1912



Lando: Germanio

Metallo: bronzo

Mezuroj: 23 x 35 mm

Jaro: 1912

Kvanto: nekonata

Pezo: 7,30 g

Medalisto: nekonata (ĉu G & S?)

Diko: 1 mm

### ***Averso:***

En la kartuŝo: busto de Zamenhof maldekstren  
sub la ŝultro: G & S (firmao Glaser & Sohn)  
sub la busto: dika striko, sub kiu germanlingva surteksto:

“ZUR ERINNERUNG AN DAS  
25 JÄHR. BESTEHEN DER  
ESPERANTO SPRACHE  
1887 1912”

Super la kartuŝo: rando kun stelo en la mezo. Ambaŭflanke ŝnureto kun  
steletoj malkreskantaj suben.

Dorsflanke: nomo kaj urbo de la entrepreno:

GLASER & SOHN  
DRESDEN

### ***Rimarko 1:***

Petletero de la redakcio por pliaj informoj al la ankoraŭ aktiva firmao en Dresdeno (vidu  
ankaŭ en Retpoŝto) restis bedaŭrinde sen respondo...

### ***Rimarko 2:***

La medaleto estis emisiita en la sama jaro kiel la arĝentaj pagmedaloj de unu kaj du spesmiloj,  
okaze de la 25-jara jubileo de Esperanto. Kontraŭe al la postaj “steloj” de Andreo Cseh la tri  
numismatikaĵoj el 1912 estis pigitaj de privataj presejoj en Svislando kaj en Germanio.

### ***Rimarko 3:***

Ke la surskribo sube sur la medalo estas germanlingva probable indikas, ke ĝi estis farita laŭ  
komisio de loka aŭ nacia esperanta-germana asocio. Jen la traduko: “Memore al la 25-jariĝo  
de la lingvo Esperanto 1887 1912”

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

### Ĝemeliĝa memormedalo Massa 1960



Lando: Italio

Metaloj: oro

arĝento

bronzo

Diametro: 30,5mm

Jaro: 1960 (20.4.'60)

Medalisto: R. Rossi

Kvantoj: 2 oraj

20 arĝentaj

1 000 bronzaĵ

Pezo: nekonata por la oraj kaj la arĝentaj,

10 g por la bronzaĵ

#### ***Averso:***

La blazonoj de la urboj Massa (Italio) kaj Bad Kissingen (Germanio) kaj surskriboj:

Supre: “-MASSA KAJ BAD KISSINGEN -

Sube: ĜEMELIĜAJ - 20 APRILE 1960 - URBOJ”

## **Reverso:**

Du kapoj vidalvide sub steleto kun radioj, kunligitaj per branĉa krono.

Sube: la nomo de la skulptisto R. ROSSI.

## **Rimarko 1:**

La itala urbo Massa eldonis tri Esperanto-medalojn, respektive en 1960, 1976 kaj 1980, el kiuj du memorigas pri la ĝemeliĝo de Massa kaj Bad Kissingen, kies urbestro estis la famega Esperanto-aktivisto Hugo Röllinger.

## **Rimarko 2:**

La 20 arĝentaj ekzempleroj estis donacitaj al la membroj de la ĝemeliĝa komitato.

## **Rimarko 3:**

La du oraj ekzempleroj al la du urbestroj.

## **Rimarko 4:**


La medalo + varianto, ambaŭ de la jaro 1976, estis jam montritaj kaj priskribitaj en jk. 1, n-ro 2, p. 4 kaj en jk. 2, n-ro 2, p. 10.

## **Rimarko 5:**


Jen la urbaj blazonoj de Massa kaj de Bad Kissingen.



Massa



Bad Kissingen



Ĝemeliĝa ĉarto en la itala el la jaro 1960

*Kun danko al sinjoro Alessandro Simonini el Massa kiu sendis akuratajn informojn.*

### **Rimarko 6:**

Ĉi varianto kun “okulo” troviĝas en la kolekto de la Esperanto-muzeo en Vieno.



### **REGUSTIGO**

**Kore dankante ĉiujn legintojn kiuj atentigis nin pri malĝusta geografia informo koncerne la medalon priskribitan en la antaŭa numero sur paĝo 11, ni nun korektas la eraron en rimarko 2. Fakte temas pri du diversaj urboj en Hispanio: Valencio kaj Palencio. Ni humile pardonpetas!**





## Tipo A 2 – Esperanto-medaloj kun neesperantaj aldonoj

### Ĝemeliĝa memormedalo Massa 1960-1980



Lando: Italio

Kvanto: nekonata

Metalo: arĝento (800)

Pezo: nekonata

Diametro: 35 mm

Medalisto: nekonata

Jaro: 1980

Diko: nekonata

#### ***Averso:***

La blazonoj de la du urboj kaj “1960 – 1980” en rubando.

#### ***Reverso:***

“XX PATENSCHAFT ĜEMELIĜO GEMELLAGGIO MASSA - BAD KISSINGEN”

#### ***Rimarko 1:***

XX = 20. En la reversa surskribo: la sama vorto en la germana, la esperanta kaj la itala.

#### ***Rimarko 2:***

Por bildoj de la blazonoj, vidu la antaŭan medalon en rimarko 5.

#### ***Rimarko 3:***

Reverse sube: nelegebla signo. Probable titro de arĝento (laŭ Jankowski: 800)

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

### Centjariĝo de la Esperanto - movado en Sosnowiec (2002)



Lando: Pollando

Kvanto: 100

Metalo: latuno  
(70 % da kupro+ 30 % da zinko)

Gravuristo: Adam Kot (firmao  
PRIOR)

Diametro: 60 mm

Pezo: 77,65 g

Jaro: 2002

Diko: 4 mm

#### ***Averso:***

Meze: granda Esperanto-stelo kaj la urba blazono de Sosnowiec.

Sube: “1902 – 2002” super laŭrobranĉa girlando kun banto.

Ĉirkaŭa skribo: “100 JAROJ DE ESPERANTO – MOVADO EN SOSNOWIEC”.

“ ★ POLLANDO ★ ”

#### ***Reverso:***

Meze: busto de Zamenhof maldekstren.

Maldekstre: “LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF”.

Dekstre: “AŬTORO DE ESPERANTO”.

Sube: “1859 1917”.

### ***Rimarko 1:***

La averson kreis komputile Kazimierz Leja, redaktoro de “Pola Esperantisto”. La koncepton Leszek Wolski, prezidanto de LKK kaj Jerzy Walaszek, iama prezidanto de Pola Filio de PEA en Sosnowiec.

La reverso estas rezulto de koncepto de Jerzy Walaszek surbaze de medalo de Józef Gosławski [juzef josuhavski].

### ***Rimarko 2:***

Sosnowiec estas urbo en Silezio (Pollando). Urborajtojn ĝi havas ekde la jaro 1902. Tamen mencioj pri setlado sur ĉiterenoj retroiras ĝis 1228.


### ***Rimarko 3:***

La urba blazono estis projektita de urba arkitekto Stefan Byszewski [biŝevski] kaj ĝi en neŝanĝita formo funkcias ekde la jaro 1904.



### ***Rimarko 4:***

La medalo memoras la centjariĝon de la Esperanto-movado en Sosnowiec (1902- 2002), kiu koincidis kun cent jaroj de urborajtoj kaj la centjara datreveno de la naskiĝo de la mondfama operokantisto Jan Kiepura. En 1925 en la urbo fondiĝis la klubo “Verda Pino”.



## Tipo D2 – (Unuflankaj) (mur)medalonoj

### Pola medalono UK 1987 Varsovio



Lando: Pollando

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: 20,36 g

Jaro: 1987

Medalisto: nekonata

Diametro: 134 mm (disko)  
158 mm (tuto)

Diko: 15 mm

#### *Averso:*

Unuflanka murmedalono sur ligna disko. Sur ĝi estas bronza disko. La medalono montras virinon kun glavo (urba statuo honore al la herooj de la dua mondmilito).

Skribo horizontala: “VARSOVIO 1987”

ĉirkaŭa: “72a Universala Kongreso de Esperanto  
100-jara Jubileo”




#### *Rimarko :*

Komparu ankaŭ kun la pola Esperanto- medalo en jk. 3, n-ro 2, p. 8



# SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ



## POR SPUREMULOJ!

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias preskaŭ nenion. Ni petas vian helpon!*

### 8a enigmo



Mezuroj: 22 x 31.

Sen gumo.

Koloroj: flavgriza, helgriza kaj ruĝa.

Valoroj: 1 spesmilo k 2, 3 kaj 5 spesmiloj.

Kvar diversaj kadretoj ĉirkaŭ la markoj.

Ornama fono kun speco de floretoj.

*Mankas al ni informoj pri ĉi tiuj folietoj. Kiu jam vidis aŭ posedas ilin?*

*Kiu konas la originon kaj la funkcion de tiuj pagiloj?*



# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (4)

### 3. Plej ĉipaj: plastaj pagiloj

“Kial ne krei plastajn ĵetonojn kun diversaj valoroj surbaze de la dise konata iama esperanta monunuo *stelo*?” sin demandis iu *Remux*. Plastaj pagiloj ja estas modernaspektaj, relative ĉipaj, sufiĉe fortaj por garantii longtempan uzon, malpezaj kaj facile distingeblaj, i.a. per diversaj helaj koloroj.



*Tiel ekiĝis la tri supraj specoj, ne nur diverskoloraj sed kun diversaj simboloj laŭvalore, nome bestaj simboloj kun historieto...:*

10-steloj: averse aperas krokodilo, ĉar ĉiĵetono estus pli ofte uzata en la t.n. gufujo kie post iom de tempo oni ekkrokodilus post komenca esperanta konversacio.

3-steloj: aperas averse papago (ne tute rekonebla!), ĉar ĉiĵetono estus pli ofte elspezata por aĉeti manĝaĵojn, kaj tiuj, kiuj manĝadas ofte, multe babiladus kiel papagoj.

1-stelo: bildo de gufo (speco de strigo), ĉar ĉiĵetono estus plej ofte uzata en la gufujo.

*Gufujo* nomiĝas la nokta te-trinkejo dum esperantaj aranĝoj, precipe dum gejunulaj renkontiĝoj. Ĝi estas alternativa trinkejo aŭ knajpo, strikte sen fumado kaj sen alkoholo, do

tute alispeca ol la “drinkejoj” dum kongresoj de “plenkreskuloj”! Laŭdire tia gufujo unue estis disponebla fine de 1995 dum Internacia Seminario en Germanio. La vorto do devenas de *guf*o, al kiu – pro belsoneco – estis aldonita la postafikso -uj- , kiu cetere havas pli vastan signifon ol -ej-.Laŭ alia fonto la uja postafikso simple signifas (*gufa*) *nesto*.

*Tiuj pagiloj kompreneble ankaŭ havas specifajn teknikajn ecojn:*

Valoro: 10 steloj

Lando: Belgio

Kvanto: 3000



Substanco: plasto

Pezo: 1,1 g

Diametro: 29 mm

Dezajnisto: nekonata

Jaro: 2012

Diko: 2,3 mm

**Averso:** surskribo: “10 steloj”. Bildo: dek steletoj.

**Reverso:** centre bildo de krokodilo. Duonĉirkaŭa skribo: “Esperanto ★ Bank – U V”  
sube: la jarindiko “2012”

Valoro: 3 steloj

Lando: Belgio

Kvanto: 3000



Substanco: plasto

Pezo: 0,94 g

Diametro: 25 mm

Dezajnisto: nekonata

Jaro: 2012

Diko: 2,3 mm

**Averso:** surskribo: “tri steloj”. Bildo: tri steletoj.

**Reverso:** centre bildo de papago. Duonĉirkaŭa skribo: “Esperanto ★ Bank – U V”  
sube: la jarindiko “2012”

Valoro: 1 stelo

Lando: Belgio

Kvanto: 3000



Substanco: plasto

Pezo: 0,84 g

Diametro: 23 mm

Dezajnisto: nekonata

Jaro: 2012

Diko: 2,4 mm

**Averso:** surskribo: “1 stelo”. Bildo: unu steleto.

**Reverso:** centre bildo de gufo. Duonĉirkaŭa skribo: “Esperanto ★ Bank – U V”  
sube: la jarindiko “2012”



### ***Rimarko 1:***

La plastaj steloj estis faritaj meze de oktobro 2012 ĉe la belga presejo Stekelbees, kun retpaĝo <http://www.plastic-coins.com>

### ***Rimarko 2:***

Okazis nur unu presado, do (ĉu provizore?) ne ekzistis diversaj eldono-variantoj.

### ***Rimarko 3:***

Tiuj pagiloj ne estas medaloj, sed konsumadaj ĵetonoj.

### ***Rimarko 4:***

Flanke de la jarindiko troviĝas du signoj, kies signifo estas nekonata.

### ***Rimarko 5:***

Plastajn stelojn oni jam uzis dum almenaŭ 25 junularaj Esperanto-eventoj:

Klaĉ-Kunveno Post-Somera (KKPS): 2012 ĝis hodiaŭ;  
Internacia Junulara Kongreso (IJK): 2013 ĝis hodiaŭ;  
Somera Esperanto-Studado (SES): 2013;  
Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita (FESTO): 2013;  
Junulara Esperanto-Semajno (JES): 2013-2014;  
Internacia Junulara Festivalo (IJF): 2017  
kaj aliaj.

### ***Rimarko 6:***

La sama presejo Stekelbees el Belgio ankaŭ pregis turistan (?) ĵetanon por la fama Esperanto-urbo Herzberg am Harz (Germanio). La mezuroj estas la samaj kiel ĉe la 1-stela konsumada ĵetono.

Averse kaj reverse la herzberga ĵetono estas samaspekta. Ankaŭ ĉinumismatikaĵo ne estas medalo. Ĉiu numismato evidente ĝojas/u pro la emisio de tiaj uzeblaj kolektaĵoj, tamen estas esperinde, ke ne vere temos pri nova manio. Komparo kun la eksterordinare belegaj bronzaĵaj medaloj, kiujn emisiis Herzberg, montras kial! *Vidu jk. 1, n-ron 3, p. 4-7.*



## MEDALISTOJ

### 13. Friedrich Moritz Brodauf (1872 – 1939)

La artisto, tute ne specialisto-medalisto, estis tamen akademia skulptisto, sed li ankaŭ laboris kiel desegnisto kaj litografo.



De 1888 ĝis 1892 li estis lernanto de Institutopri Aplikataj Artoj en Dreseno. Tiu speco de artaĵoj estis man-, maŝin- aŭ industrie farataj uzobjektoj, tamen kun artaj ecoj. Tiaj objektoj ne estis do unikaĵoj, sed produktoj de seria farado.

Brodauf sekve iĝis fakulo pri multkoloraj presaĵoj. Post laborado kiel desegnisto (rilate al polikroma litografio), li aŭtonome eklaboris kaj kreis afiŝojn, ofte en la eleganta stilo de Nova Arto (Art Nouveau/ Jugendstil/ Secession...).

En 1918 reĝo Frederiko Aŭgusto de Saksio atribuis al Brodauf la titolon de profesoro. Li deposte famiĝis pro liaj portretbustoj de saksaj eminentuloj (sur la suba medalo ankaŭ altnivela portretbusto pri Zamenhof). Krome pro liaj... glaciaj (!), bronzaĵoj kaj ŝtonaj skulptaĵoj.

Li partoprenis i.a. en ekspozicioj en Duseldorfo kaj Berlino (1907), krome en Munkeno (1908).

La suba medalo, **probable la plej malnova Esperanto-numismatikaĵo**, estis emisiita en la jaro 1909, nur kvar jarojn post la Unua UK en Bulonjo-sur-Marco! **Preskaŭ certe la modelo por la spesmilo-medaloj, la steloj kaj aliaj!**



# HISTORIAJ ASPEKTOJ

## Internacia Helpa Mono (3)



Lando: Aŭstrio

Koloroj: ruĝa , verda / nigra, blua kaj bruna

Valoroj: 2 heleroj (ruĝa)

3 heleroj (verda/nigra)

5 heleroj (blua)

10 heleroj (bruna)

Mezuroj: marko 27 x 31 mm

bildo 22 x 27 mm

Skribo: “INTERNACIA LINGVO – ESPERANTO – NIA MAJSTRO Dro. ZAMENHOF”.

### ***Rimarko 1:***

En la suba rando, sub la valoroj, troviĝas la jenaj etliteraj vortoj:

“PRANTNERS VERLAG GRAZ I.

UTH FISCHER GRAZ.”

### ***Rimarko 2:***

En Aŭstrio, antaŭ 1914, Prantners Verlag en Graz I vendis dentumitajn propagandomarkojn. La eldono Prantners promesis doni la profiton el la vendo de tiuj markoj por la disvatigo de Esperanto.

# TERMINARO

## Alfabeta listo (14)

**Negativa mono:** *monsimila valorpapero por interŝanĝo de varo aŭ laboro, kiu estas ŝarĝita per negativa interezo en kazo, ke oni ne rapide recirkuligas ĝin. La principo estis kreita fine de la 19a jarcento de Silvio Gesell, kiel reago al la financa krizo, dum kiu li perdis grandan parton de sia havaĵo.*

**Ora monunuo:** *ormoneroj, kiuj servis kiel pagiloj.*

**Orbazo:** *la monunuo de lando baziĝis sur orbazo, se la papera mono estis kovrata per oro. Do, unu monbileto egalas al certa kvanto da oro.*

**Ordeviza monunuo:** *la centra-banka rezervaĵo povis konsisti el devizoj de aliaj orbaz-monaj landoj, kiel tio okazis antaŭ la fino de la ora konvertebleco de la usona dolaro en 1971 en la Germana Federacia Respubliko.*

**Orkerna monunuo:** *papermono cirkulas kaj la oro estas rezervita ĉe la Centra Banko kiel rezervaĵo por internaciaj pagoj.*

**Poŝmono:** *malgranda monsumo por ordinaraj, malgravaj elspezoj. La nomo rilatas historie al nombro da moneroj, kiujn oni portas en la pantalonpoŝo.*

**Helero:** *etvalora monero dum la Aŭstra-Hungara Monarĥio (1867- 1918), ankoraŭ uzita en Ĉeĥio ĝis 1993 kiel subdivida valoro de la krono.*

**La Esperanto-tempobanko:** *per propra leĝo la Esperanta Civito iniciatis en 2011 la esperantan tempobankon. Ĝin administras retejo, funkcia ekde la 8a de marto 2013, honore al la virinoj, ĉar senatanino Perla Martinelli proponis la koncernan leĝon. La oficiala nomo de la Esperanto-tempobanko estas Pasvorta Reto.*

**Mona iluzio:** *situacio, kiam laboristoj aŭ entreprenoj malĝuste komprenas la evoluon de prezniveletoj. Por ekzemplo, laboristo notas, ke lia salajro plialtiĝas, sed ne tuj rimarkas, ke prezoj de varoj ankaŭ plialtiĝas.*

**Monunuo:** *vidu Valuto.*

**Konkomono:** *kolektiva nomo por la konkoj de specifaj specoj de helikoj aŭ el ties konkoj fabrikitaj rondaj disketoj. En kelkaj kulturoj en marbordaj regionoj tiuj objektoj origine havis unue artistan valoron, sekve ankaŭ ricevis pagilan valoron. Plej konataj estas la kaŭrokonkoj. Ili estis uzataj ĝis en la 19a jarcento en Bengalio.*

## **Fientrudiĝantoj ĉasas ciferecan monon eble eĉ per via komputilo**

Post WannaCry mondvaste denove centmilojn da komputiloj trafis nova cifereca atako. Tamen ĉi-foje fientrudiĝantoj ne postulas elaĉetan monon. Ili (provizore) nur celas kaperi la kalkulkapaciton de plejeble multaj komputiloj

Ekde marto duobliĝo de la bitmona valoro

La virtuala monunuco bitmono daŭrigas sian progresadon. Dume la valoro jam kreskis ĝis 2.187 dolaroj aŭ 1.948 eŭroj. **Bitmono estas pli interesa ol oro, kvankam ĝi ne ĉesis esti riska investo.** Laŭ financaj analizistoj la virtuala monunuco daŭre kreskos. En kelkaj landoj, kiel en Japanio, ĝi ja estas akceptata kiel oficiala pagilo. La malforta aspekto de bitmono estas, ke ĝi estas uzata sendepende de bankoj kaj ŝtatoj. Pro tio tre ofte ĝi estas uzata de diversspecaj krimuloj.

La krimuloj uzis denove ciferecajn armilojn, kreitajn de la usona spionservo NSA, kiuj ebligas enfiltriĝi komputilojn kun malnovaj Windows-sistemoj. La atako, nomata Adylkuzz, jam dum kelkaj monatoj estas aktiva, sed ĝi estas ege malfacile detektebla, ĉar la fiuloj agas tre subtile. Viktimoj nur konstatas, ke la rapideco de ilia komputilo malkreskas.

La kaperistoj volas agi subradare, ĉar ili celas gajni MONERO-jn, novan virtualan monunucon, pagilon taŭgan por la plej malhelaj lokoj de Interreto. (vidu en la antaŭa numero!)

Kiel gajni MONERO-jn? Oni unuavice solvu komplikajn matematikajn komputaĵojn. La MONERO-j do estas speco de rekompenco por la kontribuo al perfektigo de la pagiloreto.

Tamen la rekompenco estas privilegio por tiuj, kiuj plej rapide solvas la matematikajn enigmojn. Se oni volas gajni amason da mono, oni bezonas kalkulkapaciton. Multege da. Per la konektado de multegaj komputiloj la fientrudiĝantoj disponas specon de superkomputilo, kiu aranĝas preskaŭ neelĉerpeblan fluadon de MONERO-j, intersanĝeblaj anonime kontraŭ amaso da realaj dolaroj.

*Fonto: la belga, nederlandlingva gazeto "De Morgen" de 18.05.2017 kaj 23.05.2017.*

# **RETPOŜTO**

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

14.04.2018 10:18

*Kara amiko Jozefo!*

*Saluton! Kiel vi fartas?*

*Estas denove printempo, do je la fino de aprilo ni denove dissendos nian duan numeron al individuaj kaj asociaj membroj.*

*Mi esperas, ke ni ne faris tro da eraroj, por ke vi ne bezonu tro da tempo por ENA.*

*Ni jam tutkore dankas vin pro via provlego de la nova numero. Fartu bone!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

17.04.2018 18:39

Kara Bert,

jen la aktuala ENA-revuo kun miaj sugestoj kaj kelkaj rimark/ig/oj:

1) Ĉi kun substantivoj povas roli memstare sen streketo, ekz. *ĉi monero*. Kun adverboj kaj adjektivoj kun streketo, ekz. *ĉi-tempe, ĉi-tempa*.

2) Mi petas rekonsideri la elstarigon de *majkoro* (ne trovebla en PIV kaj konata nur por franclingvanoj) kontraŭ la PIV-aj *arĝentano, alpako, novarĝento*. Bv. rigardi ankaŭ la vikipedian artikolon *Arĝentano*.

Pri grejso vidu: <http://www.reta-vortaro.de/revo/art/grejs.html>

3) Mi ne komprenas *diĝita kidnapo*. Kidnapo signifas homrabon, ĉu temas pri cifereca homrabo, ostaĝigo?

4) Estus utile uzi pli da komunuzaj mallongigoj, ekz. ofte okazas la vortoj: jarkolekto > jk., numero > n-ro, sinjoro > s-ro, sinjorino > s-ino, doktoro > d-ro ktp.

Amike: Jozefo



23.04.2018 10:54

Koran dankon pro la bela kaj enhavoriĉa numero.  
Antonio De Salvo



23.04.2018 10:55

Kara Bert!

Elkoran dankon pro via ege enhavriĉa revuo. Estas rimarkinde, kiom da materialo ekzistas kaj „ĉiam denove aperas“.

Salutas Walter



23.04.2018 19:01

Kara Bert,

Koran dankon pro la aperigo de la medaloj el nia biblioteko en via revuo. Mi diskonigos ĝin, se vi konsentas.

Notu, tamen, ĉi rimarkojn:

1. Inter 1931 kaj 1939 la regformo de Hispanio estis respubliko ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Dua\\_Hispana\\_Respubliko](https://eo.wikipedia.org/wiki/Dua_Hispana_Respubliko)), tial ne aperas krono sur la blazono de Barcelono. Tiu kongreso okazis en junio, monaton antaŭ la eksplodo de la Enlanda Milito (1936-1939). Jen, hazarde, mi trovis ĉi priskribon de la medalo en la kataluna: ([https://books.google.es/books?id=DNByJFxi\\_I4C&pg=PA584&lpg=PA584&dq=kongreso+barcelono+esperanto+1936&source=bl&ots=kA6nvhDRuz&sig=pQOnv2q4z0AJfvyvMGVI\\_GJBR2xw&hl=es&sa=X&ved=0ahUKEwujmf337dDaAhWNHRQKHZ6oDMkQ6AEITjAL#v=onepage&q=kongreso%20barcelono%20esperanto%201936&f=false](https://books.google.es/books?id=DNByJFxi_I4C&pg=PA584&lpg=PA584&dq=kongreso+barcelono+esperanto+1936&source=bl&ots=kA6nvhDRuz&sig=pQOnv2q4z0AJfvyvMGVI_GJBR2xw&hl=es&sa=X&ved=0ahUKEwujmf337dDaAhWNHRQKHZ6oDMkQ6AEITjAL#v=onepage&q=kongreso%20barcelono%20esperanto%201936&f=false)):  
ref. 1330

2. Valencio kaj Palencio estas du malsamaj urboj de Hispanio. Valencio (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Valencio>), ĉe la mediteranea marbordo, estas pli konata internacie ol Palencio (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Palencio>), kiuj situas en la interno de la lando. Do, la 26a kongreso ja okazis en Palencio, ne temas pri ortografia afero.

Jen la lasta numero enbitotekigita: <https://hdl.handle.net/11013/5444>

Amike,

Ana Manero  
Biblioteko Juan Régulo Pérez  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[biblioteko@esperanto.es](mailto:biblioteko@esperanto.es)

23.04.2018 22:55

*Kara Ana!*

*Mi estas tre kontenta, ke la aperigo kaj priskribo de la hispanaj medaloj plaĉas al vi kaj mi dankas vin pro ĉiu estonta diskonigo.*

*Viaj rimarkoj pri la krono kaj pri la diferenco inter la du urboj estas ege interesaj informoj por mi kaj nia tuta legantaro. Denove koran dankon, krome pro la enbitotekigo de la nova numero.*

*Mi antaŭĝojas renkonti vin en Lisbono.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.04.2018 6:52

Dankon por la ena-revuo,

kaj dankon ankaŭ por la reklamo pri Turka Stelo:..

Amike

Vasil

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.04.2018 1:00

Dankon pro via , tre interesa kaj rigardinda revuo.

Sed atentu: Palencia kaj Valencía estas 2 malsamaj urboj. Do:

temas pri malsamaj urboj.

**Palencia** ( legeblas : Palen(th)ja )

**Valencia** ( legeblas : Balen(th)ja , en la nuntempo, V kaj B sonas same: sama fonemo ).

Vidu surmape:



Bondezirojn al vi :

Angel García G.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆



21.05.2018 11:19

*Kara membro,*

*Pro raporto kiu indikas ke via mesaĝujo estas plenplena, ni denove provas sendi al vi la duan numeron de la kvina jarkolekto. Bonvolu konfirmi la ricevon. Dankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

23.05.2018 21:38

Kara Bert,

Jes ĝis la momento mi ricevis ĉiujn numerojn de nia bela, interesa kaj unika revuo. La venontan-sabaton mi prelegos pri numismatiko en Nacia Evento E-o en mia urbo Bajamo. Mi informos vin.

Numismate,  
Yoandris

24.05.2018 10:36

*Kara Yoandris!*

*Mi gratulas vin pro via iniciativo prelegi pri esperanta numismatiko. Raporto (prefere ilustrita) pri tiu evento estos ege bonvena por nia revuo. Vi estos ankaŭ nia ENA-ambasadoro!*

*Amike kaj numismate,  
Bert*

30.05.2018 20:16

Kara Bert:

Mia prelego estis sukcesa. Jen kelkaj fotoj pri la Evento.  
Mi promesis ilin duan parton pri E-aj moneroj.  
Yoandris

02.06.2018 17:26

*Kara amiko!*

*Gratulojn pro la unua parto de via prelego. Mi estas certa ke via publiko estis entuziasma; tion pruvas ke vi jam anoncis la duan parton. Se mi iel (sendo de fotoj, sendo de mia teksto por prelegojkt) povus helpi vin, ne hezitu demandi. Mi jam tutkore deziras novan sukceson alvi!*

*Sur via prelega tablo (foto) mi rimarkis kelkajn monerojn aŭ medalojn.*

*Ĉu esperantajn ankaŭ?*

*Ĉu via publiko estis multe scivolema pri iuj aspektoj de esperanta numismatiko? Ĉu ili jam sciis ke ekzistas esperantaj numismatikaĵoj?*

*Dankon pro la fotoj. Mi aperigos kelkajn kun iom da klarigo en la venonta numero de nia revuo(rubriko:Anoncoj kaj Eventoj)*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

02.06.2018 21:45

Kara Bert

Mi ĉiam skribas vin tre rapide kaj mi ofte eraras, okazas ke la Net-servo en Kubo ankoraŭ estas ŝtata kaj ĝi multekostas nin.

Se DIO volas mi havos tian servon en mia hejmo baldaŭ, tiam ni povos interŝanĝi iomete plu. Dankon pro via helpo, certe mi bezonos ĝin ĉar mi ne scias kelkajn kaj gravajn detalojn pri E-a numismatiko kaj E-aj moneroj, ekzemplo kies estis la unua E-a monero kaj aliaj detaloj. Dankon denove.

Numismate,  
Yoa

03.06.2018 9:46

Kara Yoa,

*Mi supozas, ke vi povas malfermi la revuajn numerojn kiujn mi antaŭe sendis al vi, ĉu ne? Do, fotojn kaj detalojn pri la unua E-a monero (pli korekte: pagmedalo, ĉar ĝi ne estis oficiala kaj havas aspekton de medalo kun valoro) vi trovos en Jarkolekto 2 numero 1, p.4 > 8. La nomo de tiu "monero" estas SPESMILO. Pri la iniciatinto de tiu monero, profesoro René de Saussure, vi trovos informojn en la jam aperintaj numeroj de Jarkolekto 5.*

*Ne hezitu demandi ĉion kion vi bezonas por informi la kubajn esperantistojn!  
Bonvolu saluti viajn geklubanojn!*

Amike kaj numismate,

Bert (<Alberto)



01.06.2018 17:20

Kara amiko,

finfine estas nun iom da tempo ĉe mi, antaŭ ol iri al la triesta E-asocio, tial mi prenis "enmane" la lastan ENA-n por ĝin plezure legi.

Je paĝo 12a tamen trafis min io stranga. Temis pri la medalo aperinta okaze de la —XXVI a HISPANA KONGRESO ESPERANTO PALENCIAL.

Paĝfine, en rimarko 2 legeblas ke:

La 26a hispana kongreso okazis en Valencio (= —Palencial laŭ hispanaortografio)

Laŭ mi Valencio kaj Palencia estas du diversaj hispanaj urboj: Valencio troviĝas ĉe la maro kaj Palencia interne de Hispanio, iel proksime al Valladolid. Mi mem posedas plurajn poŝtkartojn eldonitajn okaze de diversaj hispanaj kongresoj, okazintaj kaj en Palencia kaj Valencio.

Eble estas mi kiu eraras, tamen bonvolu kontroli,

Plej amike,  
via Elda

02.06.2018 13:40

Saluton, kara Elda!

Dankon! Unue pro la antaŭa mesaĝo kun la du ligiloj. Mi kompreneble tuj rekonis vin sur la foto antaŭ la groto aŭ kavo.

Mi krome ege ĝojas ke kelkaj (multaj?) legantoj trovas miajn erarojn kaj sukcesas eduki kaj instrui min retroaktive... Nun mi denove lernis distingi malgraŭ miaj (mal)freshaj 70 jaroj!

Kiel vi jam scias, mi ŝatas ŝerci kaj prefere pri mi mem. Tamen la jena anonco estas tute serioza: antaŭ nelonge mortis mia germana amiko kaj "baptopatro de ENA" Hans (Johannes) Jankowski. Mi volas honori lin per "Pro memoro", tamen trovas nek foton nek pliajn informojn pri li kiel aktiva esperantisto. Mi daŭrigos serĉi.

Eta ideo por Lisbono. Vi kaj mi ja jam decidis dum la UK ne nur babili pri Esperanto sed ankaŭ pri familiaj temoj, ĉu? Kial do ne kunporti etan albumon kun familiaj fotoj por reciproke konatigi niajn geparencojn?

Korajn salutojn al vi kaj Pino!

Bert

20.06.2018 17:17

Karaj Geamikoj,

Nia kara amiko

Hans Jankowski forpasis 89jara la 10an de Majo 2018 en flegohejmo en Dortmund. Tie li vivis en siaj lastaj tri jaroj.

Antaŭ 70 jaroj (1948) li venis al nia Esperanto-movado kaj aktivis en la laborista E-movado. Li ŝatis vojaĝi kaj viziti E.-kongresojn.

Ofte li partoprenis kunvenojn en Nepalo kaj grave subtenis la tiean E-naskiĝon. Li ankaŭ ebligis al nepalaj E-istoj vizitojn en eŭropaj E-kunvenoj.

Antaŭ 40 jaroj li venis al nia ELF/AREK kaj estis aktiva en numismatiko, E-filatelo kaj erinofilio. Li eldonis i.a. jenajn katalogetojn:

1989 Esperantomono (16 paĝoj))

1989 Memorigaj Esperantomedaloj kaj -moneroj (18 paĝoj)

1993 Glumarkoj de SAT-AMIKARO (6 paĝoj)

1995 Esperanto medaloj (32 paĝoj)

2001 Esperanto-poŝtmarkoj (18 paĝoj).

Ripozu li en paco!

Elda Doerfler



10.06.2018 19:29

*Kara Peter,*

*Eble vi jam aŭdis ke antaŭ nelonge forpasis nia samideano Johannes Jankowski. Mi celas anonci lian forpason kaj verki artikolon pri li kiel esperantisto en la julia numero de nia revuo, bedaŭrinde trovas preskaŭ nenion, krome ankaŭ ne foton. Hans ne nur estis pioniro pri la numismatika fako, sed ankaŭ kvazaŭ baptopatro kaj fervora kunlaboranto de ENA.*

*Mi scias ke li estis membro de GEFA, sed ne havas kontaktulon en tiu organizo. Ĉu vi aŭ iu el via amika rondo povus helpi min?*

*Mi anticipe dankas kaj salutas vin ambaŭ*

*amike kaj numismate,*

*Bert Boon*

10.06.2018 23:40

Kara Bert,

dankon pro via informo rilate al samideano Johannes (Hans).

Same ni ne scias multon pri li. Dum la lastaj du aŭ tri jaroj li vivis en flegohejmo ie en la Ruhr-regiono.

Dum jardekoj li esploris pri "Esperanto kaj medaloj" kaj "Esperanto kaj moneroj". Laŭdire li estis granda filatelisto same por Esperanto-filatelito.

Ni nur scias, ke dum multaj jaroj li malavare subtenis la Esperanto-movadon en Nepalo. Li invitis kaj pagis kongresvojaĝojn por la afablaj nepalaj esperantistoj. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj li ofte vivis ĉiujare dum kelkaj monatoj ĉe esperantistoj en Nepalo. Kelkfoje li kunportis nepalajn esperantistojn vizitcele al Herzberg.

Bedaŭrinde ni ne scias pli.

Certe ni ankoraŭ aŭdos de vi.

Ni estas tre malgajaj pri la morto de vere aktiva kaj sukcesa esperantisto.

Amike kaj samideane salutas

Petro Zsofia



**A N O N C O J**

**&**

**E V E N T O J**

## **Grava novaĵoletero de ELF-AREK!**

Kara Geamikoj kaj Liganoj,

tre rapide alproksimiĝas nia jara rendevuo, eĉ tro rapide, ĉar multegaj aferoj ankoraŭ estas farendaj. Eĉ valizon pretigi mi devas kaj ĉefe trovi sufiĉan lokon por enmeti Elf-Arek-aĵojn!

Do, unue mi atendas vin ekde la 19a horo, sabaton la 28-an de julio, ĉe la Movada Foiro. Se hazarde estas inter vi volontul/in/o por kunhelpi, mi tre volonte kaj kun malfermitaj brakoj kaj koro akceptos ŝin/lin.

Estas jam pretaj propagandiloj, informiloj, senpagaj esperantaĵoj, kaj mi kunportos ankaŭ kvitanclibron por tiuj kiuj deziras aliĝi, re-aliĝi, pagi sian ne ĝis nun pagitan membrokotizon (por jaroj 2017 - 2018 kaj eĉ - se oni deziras - 2019). Entute mi estos je via dispono.

Apud nia tablo estos ankaŭ la Esperanto-Numismatika Asocio, kies iniciatoro estas la bone konata Albert Boon, kun kiu Elf-Arek kunlaboras ekde ĝia fondiĝo.

Plie - kaj tre GRAVE - dum la UK okazos kunsidon, renkontiĝon du-horan en Salono.... - mi ne scias ankoraŭ kie, sed vi bonvolu rigardi en la Kongresa Libro kaj tie vi trovos daton, horon, ejon: mi atendas vin nombre, nombre, invitu konatulojn, amikojn, simpatiantojn, por ke ni povu pli kaj pli grandiĝi kaj pere de ĉiaspecaj esperantaĵoj disvastigi ĉie ajn nia kara lingvo Esperanto kaj filatelon kaj numismatikon, ĉar ankaŭ nia amiko Albert Boon estos kun ni. Varme vi estas invitataj ĉeesti - eĉ vi povos mem kontribui per viaj ideoj, rakontoj, demandoj, diskutojn ktp ktp.

Se vi jam havas ian ideon pri kontribuadoj, bonvolu min kontakti retroŝte. Mi foriros mardon la 25an de julio.

Je via dispono,  
amike

Elda DOERFLER

-----  
Triesta Esperanto-Asocio  
[www.teal906.altervista.org](http://www.teal906.altervista.org)  
[www.karstajtagoj.altervista.org](http://www.karstajtagoj.altervista.org)  
-----

ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## Prelego pri numismatiko dum Nacia Evento E-o en Bajamo

La 26-an de majo en la kuba urbo Bajamo prelegis pri esperanta numismatiko okaze de Nacia Evento Esperanto nia membro Yoandris Pompa Valdespino. Laŭ lia raporto kaj laŭ la belegaj fotoj estis multsukcesa evento kaj bona informo pri ENA. Yoandris krome anoncis baldaŭ duan parton de lia prelego. Bedaŭrinde ni ne povos partopreni!

Gratulojn kaj sukceson por nia membro Yoandris!



## Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 92 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2017 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)!

**Vi rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”